**Trejnilo de Esperanta Leksiko**
Prilaboris: **Ryszard Rokicki**

# TESTO 48

## **Ekzerco 1.** Kompletigu la vortspacon.

**1.** En ĉiu ␣ **r** ␣ **n** ␣ ␣ regas aparta opinio.

**2.** Mi vagis sencele post la barakoj, mi rigardis kaj kalkulis la ␣ ␣ **l** ␣ **s** ␣ ␣ ␣ en la fortika prizona palisaro.

**3.** Britio planas pligrandigi sian maran ␣ ␣ **r** ␣ **t** ␣ **r** ␣ ␣ ␣ tuj post kiam ĝi estos forlasinta Eŭropan Union, tiel ke multaj nebritaj fiŝistoj ne plu rajtos fiŝkapti tie.

**4.** Je la fino de la strato, sur la ␣ ␣ **r** ␣ **z** ␣ **nt** ␣ vidiĝas Crochan, la sola vere elstaranta monteto en la ĉirkaŭaĵo.

**5.** La libro estas scidona el etna kaj **g** ␣ ␣ **gr** ␣ **f** ␣ ␣ vidpunktoj.

**6.** Ni portis tri **r** ␣ **b** ␣ **nd** ␣ ␣ ␣ kun surskribaĵo pri Esperanto, afiŝon, kie estis skribite "Ne al milito!" kaj tri Esperantajn flagojn.

**7.** Du el la plej ␣ **kz** ␣ **kt** ␣ ␣ atomhorloĝoj de la mondo troviĝas en la Federacia Fizik-Teknika Instituto PTB1, en la germana urbo Braunschweig.

**8.** La veturilo, al kiu estis jungitaj ok paroj da blankaj bovoj, estis preskaŭ du etaĝojn alta, kaj preskaŭ malaperis sub la amasoj da bukedoj, ␣ **tr** ␣ **t** ␣ ␣ plumoj kaj multekostaj teksaĵoj.

**9.** En 2016 oni konfiskis entute 87 ␣ ␣ **n** ␣ ␣ ␣ da opioidoj, kio respondas al la sama kvanto da konfiskita heroino.

**10.** Respektante la rajton de la eŭropanoj vidi sian hejmon ␣ ␣ **k** ␣ **r** ␣, ni miras vidante ilin allasi en tiun hejmon personojn kun dubinda (por eviti pli fortajn vortojn) reputacio.

## **Ekzerco 2.** Finskribu ĝustan vorton.

**1.** Ĵus mi aŭdis klaĉojn, ke Abcdef havas gravan malsanon: li ofte **v**␣ **m** ␣ ␣ en aviadiloj – kun tia malsano li ne plu rajtas prezidi.

**2.** Ŝia fratino Johanino volonte iradis en la grandan salonon, kie pendis la **p** ␣ **r** ␣ **r** ␣ **t** ␣ ␣ de la prapatroj.

**3.** Kelkaj arboj povas fakte vivi milojn da jaroj, dum gigantaj **t** ␣ **st** ␣ **d** ␣ ␣ de la Galapagoj povas iĝi eĉ 170-jaraj.

**4.** Viktor sidis ĉe la eta tablo sur la **t** ␣ **r** ␣ **s** ␣, trinkis kafon kaj fumis.

**5.** Agu do, kiel vi volas, sed memoru, ke Fenicianoj en niaj bienoj estas kiel **sc** ␣ ␣ **r** ␣ ␣ en la grenejoj: kiam unu englitos tra fendo, aliaj sekvos lin.

**6.** Finfine, Zamenhof estis edukita en **s** ␣ **n** ␣ de la rusa kulturo, kiu ne povis ne influi liajn pensojn.

**7.** La tiel nomata dinastio Anĵuo sendis el la samnoma provinco korpuson de kavaliroj elektitaj por neniigi la lastan plotonon de saracenaj soldatoj **l** ␣ **j** ␣ **l** ␣ ␣ al la ŝvaba imperiestro.

**8.** Dume sanaj maljunuloj ne rajtas labori, eĉ se ili volas kaj povas, ĉar **r** ␣ **g** ␣ **d** ␣ sociala sistemo ne permesas al bonfartaj 66-jaruloj resti en siaj postenoj.

**9.** Kvankam mia amiko kaj mi estis la solaj blankhaŭtaj pasaĝeroj, oni traktis nin tre amike kaj simpatie – oni laŭvice transdonis al ni rumbotelojn, kiuj **c** ␣ **rk** ␣ **l** ␣ ␣ de buŝo al buŝo.

**10.** Hundertwasser mem **fl** ␣ **k** ␣ ␣ siajn pantalonojn kaj mem faris siajn sandalojn; kiel malamanto de simetrio li ĉiam portis du diversajn ŝtrumpetojn.

## **Ekzerco 3.** Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

violon', akuz', est', sulk', profesor', opozici', interpret', porci', don', form'.

**1.** Por mi esperanto estas unuavice **r** ␣ **f** ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ **m** ␣ socia movado, kies celo estas ŝanĝi la nunan lingvan ordon en la mondo.

**2.** La **ĉ** ␣ ␣ ␣ **t** ␣ **n** ␣ ␣ **r** ␣ de la festivalo vizitas la ornamitajn tendojn de la kuirantoj de la brasikoj, fotas, aŭskultas muzikon, manĝas kaj trinkas, precipe bieron.

**3.** Tiu projekto, kiu ricevis subvencion de 1 476 400 eŭroj, celas laŭgrade ␣ **l** ␣ ␣ **n** ␣ en sep eŭropaj landoj librojn pri romaaj muziko, kulturo, lingvo, literaturo, tradicioj kaj etno.

**4.** Dum kaj post la dua mondmilito en Britio varoj kiel butero, sukero, faruno ktp. ne estis facile aĉeteblaj; ili estis ␣ ␣ **r** ␣ ␣ ␣ **m** ␣ **t** ␣ ␣ kaj kutime vendataj senpakaĵe.

**5.** Kune kun politikaj malamikoj kaj sensaci-produktema ĵurnalistaro, ŝtataj ␣ ␣ ␣ **z** ␣ ␣ **t** ␣ ␣ ne sobre esploris duban supozon, sed kreis detruan persekutadon.

**6.** La poeto venis hejmen, li venis el koncertejo, kie li aŭdis bonegan ␣ ␣ ␣ **l** ␣ ␣ ␣ **s** ␣ ␣ ␣ kaj estis tute plenigita kaj emociita de lia nekomparebla ludado.

**7.** Ben Barka estis prezidanto de la maroka nacia asembleo, kiam Maroko sendependiĝis en 1956 de Francio, kaj ĝis 1959 estis ĉefa ␣ **p** ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ **l** ␣ al la maroka reĝo.

**8.** La juvelisto ĉesis miregi, lia malalta frunto tamen tre videble ␣ ␣ **l** ␣ ␣ **ĝ** ␣ ␣ kaj liaj viglaj okuloj montris konfuzitecon.

**9.** En aŭgusto, en la brazila urbo Fortaleza preskaŭ 1500 esperantistoj el pli ol 60 landoj vigle diskutis – sen ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ **t** ␣ **s** ␣ ␣ ␣ kaj sen la angla – la minacon de lingva katastrofo.

**10.** La surloka sesio de tiuj postdiplomaj studoj okazas nur unufoje dum la semestro, la internacia studentaro ĝuis prelegojn de internacia ␣ ␣ ␣ **f** ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ **r** ␣.

**Ekzerco 4.** Marku taŭgan vorton:

**1.** Komoj dividas longan frazon en supervideblajn ___ kaj, tiel montrante tuj la strukturon de la tuto, faciligas la legadon.

**a.** ribojn **b.** uniformojn **c.** propoziciojn **d.** traktatojn

**2.** Andy Warhol estis ___ de *pop-art*, li komencis per la uzado de bildoj el populara kulturo kaj ĉiutaga vivo: dolaraj biletoj, boteloj de Coca-Cola, sup-etikedoj, diversaj famaj personoj.

**a.** pioniro **b.** rubando **c.** uniformo **d.** vespo

**3.** En la dezerto oscedis la hienoj kaj ___, kaj la dormetanta leono streĉis siajn potencajn membrojn, sin preparante persekuti la akiron.

**a.** lardo **b.** jubileo **c.** fluido **d.** ŝakaloj

**4.** En Kantono, urbo en suda Ĉinio, kie estas bona ekonomia ___, konstrukosto de plej luksa tombo estas pli ol 400 000 juanoj.

**a.** situacio **b.** fotelo **c.** kuniklo **d.** kaĝo

**5.** La vivo ne estas filmo – ne eblas returni la ___ aŭ reĝisori denove iun epizodon, kiu estis fuŝe ludita aŭ kiu povus konfuzi la sekvajn epizodojn.

**a.** latunon **b.** ruinon **c.** oficiron **d.** bendon

**6.** Lumumba unue estis tenita en sia rezidejo, ___, estis arestita, denove fuĝis kaj iel alvenis en Katangon.

**a.** eskapis **b.** trejnis **c.** falĉis **d.** suĉis

**7.** Eŭropa Unio intencas ___ la maltan kaj kalkuli Malton kiel plian anglalingvan landon.

**a.** riveli **b.** injekti **c.** ignori **d.** ĉeesti

**8.** Venis la aŭtuno kun pluvo kaj neĝo; la akvo staris kaj kovris la tutan ĉirkaŭaĵon de la urbo, la tero ne povis enpreni en sin la tutan akvon, oni devis ___ aŭ eĉ veturi per boato.

**a.** spiti **b.** zumi **c.** tajpi **d.** vadi

**9.** Oni rimarkis, ke Conrad, kies lingvo dum fruaj jaroj estis la pola, tamen verkis ĉiujn ___ per eleganta angla.

**a.** mirtelojn **b.** romanojn **c.** vejnojn **d.** ŝinkojn

**10.** Iuj el la lokaj homoj loĝas en *casais*, unuĉambraj pajlobudoj, tio estas ĉefe en vilaĝetoj, kie ili bredas ŝafojn kaj kultivas ___ kaj legomojn.

**a.** sekalon **b.** monstron **c.** hepaton **d.** fontanon